

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 7-a parto
Claude Gacond, 271-a radioprelego, 1968.12.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la rakonton pri la restado de Gandhi en Svislando, nin inspirante de la tagĵurnalo de Romain Rolland, ĉe kiu la hinda gvidanto restadis en decembro 1931 post la Konferenco de la Ronda Tablo okazinta en Londono.

A.- La pasintan semajnon ni vidis, kiel naskiĝis kverelo inter Gandhi kaj svisaj ĵurnalistoj, kiuj provis diri la kontraŭon al la paroloj de la Mahatma. Ni vidis, ke Gandhi publike esprimis sian naŭzon por similaj mensogoj. La kulpaj ĵurnalistoj forlasis la laŭzanan mitingeton klakante la pordon.

Cl.- La ĵaŭdon 10-an de decembro okazis en Genève dua mitingo. La publiko alkuris en la salonegon de Victoria-Hall, kie en 1906 disvolviĝis la dua Universala Kongreso de Esperanto. Jen kiel Romain Rolland raportas en sia tagĵurnalo pri tiu manifestacio :

A.- « *En la Victoria-Hall estas ega homa alfluo... La unuajn loĝiojn rezervis la alta ĝeneva burĝaro, kiu estas malfavora al Gandhi... En la parteroj kaj amfiteatroj svarmas la entuziasmo kaj la socialistoj. Alfrontiĝas du sintenoj. Gandhi, simpla kaj kvietita kiel kutime, respondas al la ricevitaj demandoj kun konsterniga neteco por la kontraŭuloj, kiuj lin gvatas kaj provas lin faligi en kaptilojn.* »

Cl.- Romain Rolland daŭrigas : « *Mi ne raportas pri tiu mitingo tamen gravega, en kiu mi ne ĉeestis, eĉ per radio-disaŭdigo : ĉar tiun ĉi fojon la svisaj radioj silentis. Anonco avertis, ke post iuj malagrablaj kaŭzataj de la radio-dissendado de la mitingo en Lausanne, la disaŭdigo de la mitingo en Genève ne okazos. Evidente petis tion la gazeto **Journal de Genève**. La svisa burĝaro eraris, se ĝi kredis, ke tiu rimedo estis sufiĉa por silentigi la danĝeran voĉon de Gandhi : kaj, eĉ post Lausanne, ĝi ne antaŭvidis la trankvilan aŭdacon de la publika parolado de Gandhi en Genève, kaj ties resonon ĉe la hom-miloj, kiuj ĝin aŭdis.* »

A.- Dank'al la iniciativo de la Internacia Ligo de la Virinoj por la Paco kaj Libereco, kiu stenografiis tiun debaton, oni hodiaŭ povas konstati la eksterordinarecon de tiu mitingo.

Cl.- Ankoraŭ hodiaŭ la paroloj de Gandhi vekus la koleron de granda parto de la svisa popolo kaj de ties aŭtoritatoj. Do ni povas kompreni, ke tiu mitingo estis konsiderata de la svisa burĝaro de 1931 kiel provokado. Ni redonu la parolon al Romain Rolland :

A.- « *Gandhi senhezite alfrontis la du brulvarmajn demandojn pri kapitalismo kaj militismo, pelante tiun lastan sur la terenon, kiun la burĝa Svislando penadas konsiderigi kiel sanktaĵon kaj proprajn apartajn al neŭtrala kaj armita nacio.*

Cl.- *Unuparte li diris, ke la Laboro ne konas sian povon, kaj ke se ĝi ĝin konus, sufiĉus al ĝi leviĝi, por ke la tuta kapitalismo kaj la mondo konstruita sur ĝi falegu ; ĉar la Laboro estas la sola efektiva forto en la mondo.*

A.- *Aliparte li diris, ke ĉiu militismo, ĉiu armeo estas kondamnindaj, kaj ĉefe la militismo kaj armeo de nacio, kiu sin diras neŭtrala kaj sen atakemo.* »

Cl.- Romain Rolland ankoraŭ raportas, ke al la demando. « *Se fremda armeo volus transiri Svislandon por povi ataki alian nacion, ĉu ne estus la devo de Svislando ĝin malhelpi kontraŭmetante la barojn de sia armeo ?* » Gandhi respondis : « *Nature, via devo estus ĝin malhelpi. Sed la sola vera rimedo estus al ĝi kontraŭmeti la muron de via popolo : viroj, virinoj kaj infanoj senarmilaj. Neniu armeo kuraĝus paŝadi sur iliajn korpojn. Kaj se ĝi tion farus unu fojon, ĝi ne refarus duan fojon ; ĉar la ribelo de la universala konscienco tion al ĝi*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 7-a parto
Claude Gacond, 271-a radioprelego, 1968.12.18 & 21

riproĉadus : tiel via ofero portus fruktojn. » Ni havas tie la priskribon de la kampanjo, kiun Gandhi gvidadas en Hindio. Kaj hodiaŭ ni konstatas, ke ĝi portas fruktojn. »

A.- Romain Rolland daŭrigas : « *Tiuj du temoj tuŝitaj de Gandhi ne sufiĉis. En la urbo de la Ligo de Nacioj li ankoraŭ trovis la aŭdacon kritiki tiun institucion. Li parolis kun malŝata seninteresiĝo, kvazaŭ kiel se li ĝin ne konus, pri la Ligo de Nacioj, kaj li advokatis por ĝin anstataŭigi per Internacia Civila Servo, kiu estu pli vasta kaj pli kompleta, ol tiu de Pierre Ceresole, kaj etendiĝus al ĉiuj mizeroj de la universo.*

Cl.- *Aplaŭdoj de parto de la aŭdantaro salutis la kaptitajn demandojn. Sed aplaŭdoj de la alia parto rebatis substrekante la kvietajn kaj decidigajn respondojn de Gandhi. »*

A.- Romain Rolland konkludas : « *Dum la mitingo mem manifestiĝis nenia koleremo. Sed la granda burĝaro de Ĝenevo eliris la teatrejon en stato de neesprimebla furiozo ; kaj mi travivis multajn eĥojn pri tio. Estis tre bone, ke la mitingo okazis la antaŭtagon de la forveturo de Gandhi el Svislando. Povas esti, ke se lia restado estus plilongiĝinta, oni estus petinta pri elpelaj rimedoj. Ĉiukaze alia publika mitingo estus estinta malpermesita. »*

Cl.- Pri la gazetara reago Romain Rolland raportas tiel : « *La romanda gazetaro publikigis la morgaŭon furiozajn artikolojn. La gazeto **Courrier de Montreux**, kiu ĝis tiam pensis necese lin indulgi, same kiel min, publikigis unuan artikolon, kiu asertis, ke el ĉio, kion Gandhi faris dum tiuj kvin tagoj en Svislando, la plej bona estis forveturi. Kaj oni lin denunciis kiel samtempe nekonscian kaj konscian instrumenton, kiu eniras Svislandon por malarmigi kaj detrui, por povi poste liveri la senarmilan popolon al la atakemo de la komunismo. Kaj oni ektrovis plian ateston pri tiu perfidema taktiko en la fakto, ke Gandhi restadis ĉe **la bolŝevisto Romain Rolland**. »*

A.- Gandhi restis en Ĝenevo nur la ekzaktan tempon por sia parolado. Tuj poste li reveturis sen aŭdienci iun ajn. Li nur respondis kun reĝa senĝeno al la petoj pri aŭdienco de la verkisto Albert Thomas kaj de Guglielmo Ferrero, profesoro en la Universitato, donante al ili kiel lokon kaj tempon por konversacio, al Ferrero :

Cl.- « *en la trajno inter Gland kaj Lausanne* »

A.- kaj al Albert Thomas :

Cl.- « *en la trajno inter Lausanne kaj Montreux.* »

A.- Karaj geaŭdantoj, mi ne pensas, ke inter ni multaj estus havintaj la kuraĝon gastigi Gandhi kaj lian sekvantaron, kiel faris Romain Rolland. Tiuj rakontoj reliefigas la grandecon de la franca verkisto kaj ankaŭ reliefigas la senliman senĝenon de Gandhi. Oni pli bone komprenas la timon, kiun li vekis ĉe la britaj koloniistoj en Hindio, kiam oni sekvas lian kelktagan veturadon tra Svislando. En kvin tagoj li kapablis kolerigi eĉ siajn amikojn.

Cl.- Tiuj informoj pri la restado de Gandhi en Svislando estas ĉerpitaj kaj tradukitaj el la tagĵurnalo de la franca verkisto Romain Rolland.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-